


LA JUNA VIVO

MONATA ORGANO
POR LA

JUNULARO KAJ
KOMENCANTOJ



Redakcio kaj Administrado:
West-Graafdiijk (N.H.)
Nederlando.
Gironumero 209354 Nederlando.

Jarabono:
Nederlando: 0.80 guldeno
Eksterlande: 11 fr.fr.; 0.70 dol;
2.1 sv. fr.

MIA DEBUTO.

(De Ĉarlo Bertolazzi).

„Necesas enpense reiri dudek kvin jarojn, al la bela tempo de mia juneco.....

Pasio kaptis min: fariĝi aktoro! Sed kion fari? Kie trovi la ku-raĝon prezenti min al iu trupestro? Alta du manplatojn, kaj sen lipharoj?

La hazardo estis favora al mi. Dum mia aŭtuna ferio mi estis en la kampo. Iun belan tagon (neniam mi forgesos la ĝojon de tiu horo) lokaj diletantoj aranĝis bonfaran prezentadon. Necesis akiri rolon. Mia onklo, kiu gvidis la grupon, direktis la rigardon al mi.

„Ĉu vi ankaŭ deziras deklami?”

Ho ĉielo! Mi certe ruĝiĝis kiel kuirita kankro.

„Certe mi deklamos!”

„Ĉu vi sentas vin kapabla?”

„Se ne, mi lernos la rolon parkere, ne dubu!”

„Bonege. Vi estos estro de karcero. Morgaŭ mi donos al vi la rolon kaj postmorgaŭ ni faros la unuan provon.”

Ŝajne mi tute ŝanĝiĝis. El knabo mi subite iĝis viro! Mi deklamos antaŭ la publiko en vera teatro, en la lumo de la scenlamparo, kun sufloroj! Patrino mia, kia feliĉo!

Mi pasigis sendorman nokton, songante kun malfermitaj okuloj. Ne estis pli ol dek linioj da prozo, nemulte, por diri la veron, sed kia okazo! Mi rememoras perfekte.....

— Johano (maljunulo kun longa blanka barbo, vestita kiel estro de karcero. En la dekstra mano li tenas oleo-lampon, en la maldekstra ŝlosilaron. Eniras malrapide, proksimiĝas al

pajlo-matraco, sur kiu kuŝas malliberulo, rigardas la malliberulon, kaj skuante lin vekas): „Leviĝu! Via horo sonis..... Preparu vin al la morto!” (La malliberulo ne respondas. Johano klinas sin super li. Komprenante, konsterniĝas): Ho Dio, li estas morta! Dio estas justa! (Direktas sin internen): Gardistoj, he, helpu! La grafo estas morta (rapide foriras).

Kion vi diras pri tio? Ĉu ne estas belega rolo? De tiu momento mi ne plu havis trankvilon. Mi aŭdis kaj vidis nenion. Mia patrino vokis, la patro riproĉis, mi ne plu havis tempon! Nek por manĝi, nek por promeni, nek por ludi. Studi la rolon, kuri al la provoj, jen resumo de mia tiama ekzistado.

Jam du semajnojn antaŭ la prezentado forte batis mia koro, kvazaŭ mi devus deklami la saman vesperon. La tutan tagon mi sidis kun folieto en mia mano, ripetante, laŭtvoĉe: „Leviĝu, via horo sonis! Preparu vin al la morto!” Mi akompanis la parolojn per teruraj gestoj, ŝanĝante la voĉon, irante per grandaj paŝoj precize kiel en fama tragedio. — Kaj eĉ la provoj? Ĉiam unua alvenis kaj lasta foriris. — Mi restis tie horojn pacience atendante mian vicon. Mia rolo estis en la kvina akto, sed mi ne atentis tian malgrandaĵon. Mi aŭskultis la tutan provon, de la komenco ĝis la fino. Post unu semajno mi sciis la tutan dramon parkere.

Venis la vespero de la prezentado. Mi ne kapablas priskribi al vi la staton de mia animo, vi mem imagu!

La spektaklo devis komenci je la naŭa horo. Je la sesa mi jam estis preta foriri.

„Sed kien vi iras jam nun?”

„Al la teatro!”

„Sed restas ankoraŭ tri horoj”

„Mi devas maski min, mi devas vesti min kiel karcerestro!..... Devas surmeti la barbon!” — Kaj for mi estis.

Mi bezonis uniformon. Oni dons al mi pantalonon kaj jakon de mia kuzo, lernanto en milita kolegio. Pro la multaj provoj de la dramo, oni forgesis provi ankaŭ la kostumojn. Mi tuj spertis tion. Mia pantalono estis longega, larĝega. Kion fari? Nenia timo! Oni faldis ĝin supren kaj ligis ĝin al mia korpo. Rilate la jakon, en tiu mi tute perdiĝis. Kaj plue, ĝi pezis. Dio mia! Kiom ĝi pezis. Ankoraŭ estis Aŭgusto. Varmege! Fi! Por akiri famon mi devis ŝviti! Kaj kiom! — Kaj la barbo? Devis esti longega..... Kiu pruntedonos al mi barbon? En la kampo ne troviĝas teatraĵ perukistoj.

Kaj do? Helpe de gluo, peniko kaj franĝo, jen preta la barbo! Mia kompatinda, senbarba vizaĝo! La gluo gutis suben, laŭ la vangoj kaj mentono sur la bruston.

La kurteno ankoraŭ ne leviĝis por la unua akto kaj mi jam promenis inter la kulisoj kun la ŝlosilaro en la dekstra-, la lampo en la maldekstra mano, preta por kontraŭstari la juĝon de la publiko. Fine alproksimiĝis la kvina akto. La solena momento venis!

„Karlo, estas via vico! Eniru la scenejon!”

La sango leviĝis al mia kapo. La scenlamparo, la lumoj, la kontrabaso en la orkestro, la anguleto de la sufloro, la publiko, Ĉio intermiksiĝis antaŭ miaj okuloj.

Momenton mi restis malcerta kaj konfuzita, poste, energie, ekserĉis mian malliberulon. — Neatendite mi denove devis halti. Kio okazis? Ho, mi sentis ion sur la korpo, kio malleviĝas..... Ho Dio! Estis mia pantalono, kiu malrapide malsuprenglitis ... Kiel malhelpi tion? Miaj manoj ligitaj. La lampo en la dekstra, la ŝlosiloj en la maldekstra. — El la kulisoj atingis min ordona voĉo: „Antaŭen!”

Antaŭen..... facile diri: Antaŭen! sed en tiaj cirkonstancoj. La momento estis terura. — Du paŝojn ankoraŭ..... Sub la piedoj mi jam sentis la ŝtofon de la pantalonotuboj. Ĉu mi falos? Ĉu mi restos antaŭ la publiko en kalsono? — En kalsono!..... Antaŭ la publiko..... Pensu!! — Mi pasigis minuton, kiu ŝajnis jarcento. Fine, iel ajn mi devis progresi, mi faris lastan klopodon. Ankoraŭ tri paŝojn, glitmarŝante. Mi venis ĉe la pajlomatraco, kaj rigardis malsupren, mi ankoraŭ estis en la pantalono! Feliĉe! Mi respiris, estis mia vico por paroli. — Ho ve, la vortoj ne volis eliri..... Mi havis nodon en la gorgo..... balbutis: „Leviĝu..... Via horis sono!”

La rido, kiu sekvis tiun balbuton mutigis min. La sufloro tamen laboregadis, frustrante: „Malsupren! Klinu vin! Malsupren, rigardu la malliberulon!”

Mi klinis min..... La movo estis fatala..... Mi rimarkis, ke mia pantalono definitive forglitis. Tiam mi pensis eksidi sur la teron, senmove... Iu ajn sanktulo helpos min. Tamen en tiu momento ĉiuj sanktuloj forlasis min..... Alia malfeliĉo min atendis. La lampo, kiun mi tenis en la mano, ekbruligis mian barbon. Tiam okazis tio, kion neniu iam ajn pensus: La mortulo, kuŝanta sur la matraco, subite eklevis sin por ŝiri la belan barbon de mia vizaĝo. En la publiko granda moviĝo..... oni ridis..... kriis..... Malsupren la tukon! Malsupren la tukon. — La kurteno falis.

Mia onklo estis furioza. Li venis al mi, siblante: „Pro via kulpo!
Vi ruinigis la dramon!”

„Ruinigis! Ĉu vi ne aŭdas?”

La publiko aplaŭdadis freneze kaj vokis min per mia nomo. Plurfoje mi devis reveni por danki.....

Evidente mi estis granda!

El la itala trad. PIKILO.

Por Komencantoj.

DUMNOKTO.

(Melodio de Eŭgen Hildach: „Lenz”)

Kun fringokant' kaj viol-odor'
Printempo ĉasis la vintron for.
Subite, sekrete, dum nokta silent'
Ĝi venis al ni sur flugiloj de l'vent.
Kaj nun ĝi lumegas kun brila radi'.
Malfermu la pordojn, la korojn al ĝi!
Salutsonoriloj sonu en ĥor'!
Kun gloraj jubiloj por ĝia honor'!

Dumnokte kiel per sorĉa far'
La mondon ornamis ĉeriz-florar'.
Fariĝis dumnokte la ter' kaj ĉiel'
Miraklo surpriza, miriga fabel'.
El domo kaj domo, el koro kaj kor'
Ĉagrenojn ĉasis la rido for.
Kaj ĉie kaj ĉie de voĉoj mil
Laŭtiĝas ebrie printempo-jubil'.

Berlino (Germ.)

K. VANSELOW.

Tasko:

1. Faru verkaĵon laŭ unu el jenaj temoj: 1. Sur la marbordo. 2. Miaj libroj. 3. Mia hundo. 4. Birdoj dum la vintro. 5. Somera ekskurso.
2. Traduku kaj lernu parkere jenajn proverbojn: Ŝiru rozojn en somero, ĉar en vintro ili ne estas. — Doni ovon por ricevi bovon. — Ĉiu birdo kantas laŭ sia beko. — Vivo sen modero kondukas al mizero. — Laboro kondukas al oro kaj gloro.
3. Lernu parkere: „Dumnokto” kaj deklamu ĝin en via grupkunveno.

Bona ekzemplo! S.ro Flossmann (Košice, Ĉeĥosl), trad. „La Matsujama Spegulo”n, el „L.J.V.” No. 7, '37, kaj sukcesis aperigi ĝin en 3 diversaj gazetoj. Do bonega propagando por Esperanto.

LA TRO LONGA PANTALONO.

Teatraĵo duakta.

Personoj	}	La patro	}	Lena, la filino.
		La patrino		
		La avino		

(La scenejo prezentas familian ĉambron. La patrino kaj la avino sidas ĉetable, brodas aŭ trikas.)

Patrino: Jam la sesa! Mi ne komprenas, kie Johano restas! Neniam li venas tion malfrue.

Avino: Ne. Eble estas multe da laboro en la oficejo.

Patrino: Kaj ĝuste nun malbone trafas, ĉar hodiaŭvespere ni kune eliros por aĉeti pantalonon.

Avino: Ĉu novan pantalonon?

Patrino: Jes. Antaŭ kelkaj tagoj li falis kun sia plej bona kostumo. Unu genuo tute trapikis! Kaj morgaŭ li devos forvojaĝi kaj li ja ne povos iri kun tiu pantalonon. *(paŝoj aŭdiĝas)*. Mi kredas, ke ĝuste li alvenas.

Patrino: *(envenas, paketo subbrake)* Bonan vesperon al vi!

Patrino kaj avino: Bonan vesperon!

Patrino: Tre malfrue!?

Patrino: Jes, vi sciu, mi venas laŭ la Butikstrato kaj jen, mi vidas en iu montra fenestro belegan pantalonon. Kaj ege malmultekosta! Brunstriita pantalonon. La prezobiletio indikis: de 18 guldenoj, nun por 14. Tiun pantalonon mi havigu al mi, mi pensis. Tuj en la butikon aĉeti ĝin. *(elpakas)*. Jen ĝi! Nu, kion vi diras?

Patrino: *(rigardas gravmiene)* Hmm.....

Patrino: Nu, ĉu ne bela?

Patrino: Sed ni ja irus kune. Vi ja ne havas komprenon pri bona aŭ nebona ŝtofo. Eble ĝi estas malbona aŭ ne bone vestas vin.....

Patrino: Ne bone vestas min!?? Mi tuj provos. *(foriras)* *(La patrino kaj la avino manlaboras)*.

Avino: Mi esperas, ke oni ne trompis lin.

Patrino: Tiam li mem kulpas.

Patrino: *(envenas kun la pantalonon, kiu estas multe tro longa):* Nu, kion vi opinias pri ĝi?

Patrino: *(konsternite)* Sed edzo! Kiel vi aspektas! Ĝi estas multe tro longa! Certe dekdu centimetrojn!

Patrino: Mi suprentiros ĝin.

Patrino: Ne multe helpos! Estas tro malbele!

Patrino: Hm jes, — iom tro longa ĝi certe estas.....

Patrino: Tio nun rezultas el via troa memfido.

Patrino: Nu jes. Okazis ja. Sed vi certe povos depreni parton de la tuboj?

Patrino: Kiu? Mi? Ho ne! Mi dankas. Estas laboro por tajloro. Mi tion ne faras. Vi mem kulpas kaj vi mem elsavu vin!

Patrino: *(sin turnante al la avino)* Patrino, ĉu vi bonvolus ĝustigi ĝin?

Avino: Ĉu mi, Johano? Volonte — se mi povus. Sed vi scias ja, ke miaj okuloj ĉiutage pli malboniĝas. Tian delikatan laboron mi ne plu povas distingi.

Lena: (dume envenas) Bonan tagon, vi ĉiuj. (rimarkas la patron) Ho ĉielo, paĉjo! Kion vi surmetis? (ridas) Kiel vi aspektas! Vi similas Charlie Chaplin kun la harmonik-pantalono!!

Patro: Nu, ĉesu tiun ridadon! He Lena, ĉu vi povus fortranĉi parton?

Lena: Ah ne, patro. Tion ni ne lernas dum la kudrolecionoj.

Patro: Kion do vi lernas?

Lena: Nu, brodi tapiŝetojn kaj tiel plu. Sed ne mallongigi pantalonojn. Ho, mi ridas ĝismorte.....

Patro: Nu, mi mem elsavos min. (foriras kolera).

Patrino: Lena, ĉu vi havas hejmtaskojn?

Lena: Ho jes, multajn. Grandan ripetadon pri esperanta historio, morgaŭ. Kaj ankoraŭ neniom mi scias pri ĝi.

Patrino: Nu, iru al via ĉambreto, supre. Estas pli trankvile tie.

Lena: Bone, patrino. (foriras).

Patro: (envenas, eksidas) Antaŭ ol mi forgesas — hodiaŭvespere mi devas iri al kunveno. Kaj morgaŭ frue ellitiĝi: je la sesa, ĉar mi devas vojaĝi al Amsterdamo.

Patrino: Kaj kiun pantalonon vi surmetos?

Patro: Ĉu mi scias — miaparte la novan. (ĵetas ĝin sur seĝon).

Dua akto.

(Antaŭ ol la kurteno leviĝas eksonas la deka horo. La scenejo estas iom mallume. Envenas la patrino en noktrobo, kun kandelo; ŝi prenas la pantalonon kaj krudroskatolon, fortranĉas parton kaj kudras, dum ŝi diras:

Patrino: Ne, mi tamen ne povas toleri, ke Johano tiel foriros. Li ja ne aspektu ridinde. Jen tiel, mi forprenas manlarĝon..... Kaj nun kudri. Ne povas fariĝi tre precize, sed estu nur por unu tago, jam sufiĉos.. Poste mi ankoraŭ povos plibonigi ĝin..... Sed kiom stulta li estis, ke li antaŭe ne provis ĝin..... Mi lasos ĝin ĉi tie; kiam li morgaŭ trovos ĝin, estos surprizo. Kaj nun ree en la liton. (foriras).

(La horloĝo batas la 11-an. Lena envenas en noktkostumo kun kandelo).

Lena: Mi kredas, ke mi nun jam povas sonĝi pri la internaciaj kunvenoj. La patrino jam enlitiĝis kaj tial mi prenis la kandelon. Tiel ŝi ne rimarkos, ke mi venis malsupren. (prenas la pantalonon kaj kudrilaron). La patro estus tre kompatinda, se li devus forvojaĝi en tiu ridinda pantalonon. Sed mi volas surprizi lin. Mi ĝustigos la pantalonon por li. Jen do, mi ektranĉos; mi forprenos sufiĉe grandan parton..... Nu, la patrino verŝajne pravos, ke ĝi ne estas tre bona: kiom malbele ĝi estas kudrita! Mi do ne bezonas tre bele kudri, se ĝi nur estu kudrita! Dume mi ja povas ripetadi la historiajn faktojn:

1859 Doktoro Zamenhof naskiĝis, en Bjelostoko (Polujo).

1887 Doktoro Zamenhof publikigis Esperanton.

1905 Unua Esperanto-Kongreso (en Boulogne-sur-Mer).

Jen preta! (foriras).

(La horloĝo batas la dekduan. La patro envenas kun kandelo).

Patro: Ah, kia enuiga historio, tia kunveno. Kaj tre malfrue jam estas. Kaj morgaŭ tre frue ellitiĝi. Mi tamen ankoraŭ rigardos la pantalonon (prenas ĝin). Domaĝe, ke ili ne konsentis mallongigi ĝin por helpi

al mi. Sed diable! mi mem povas helpi min. (*prenas kudrilaron*). Tiuj virinoj konstatos, ke mi ne bezonas ilin. Manlarĝon mi certe devas fortranĉi (*tondas*). Jen unu, jen la alia. Kaj nun kudri. Feliĉe, jen mi trovas kudrilon kun ĝusta fadeno. Kaj nun faldi kaj ree faldi... Ho, jam bone funkcias. Aŭ, mia fingro! Kaj plue nun. Bele, unu jam estas preta, kaj nun la dua. Ke ĝi nur ne malfiksiĝu; postmorgaŭ mi portos ĝin al la tajloro. Kiajn okulojn ili morgaŭ faros! (*foriras*).

(*La horloĝo batas la kvinan; la avino envenas kun kandelo, en noktrobato; ŝi prenas la pantalonon kaj kudrilaron*).

Avino: Ne, tion mia koro ne permesas al mi, ke tiu bona Johano devas forvojaĝi en tia pantalonon. Feliĉe, ke mi tre frue vekigis. Nun mi povos surprizi lin..... Manlarĝon mi certe devas forpreni. (*tondas*) Ne, la okuloj de la avino ne estas plu tre bonaj, sed ĉi tion mi tamen povas vidi. Ah, kiom ofte mi sidis tiel, antaŭe, kiam mi devis fliki liajn pantalononjn..... li eluzis multajn. Vere, li estis sentaŭgulo! Sed tamen tre bona filo al sia maljuna patrino. Jen do, jam preta..... Kaj nun mi volas ankoraŭ iom dormi. (*foriras*).

(*La horloĝo batas la 6-an. La patro envenas en kalsono*).

Patro: Hieraŭ mi lasis la pantalonon ĉi tie, mi kredas. — Ha, jen, ĝi estas. (*surmetas ĝin*) Sed kio okazis? Granda ĉielo! Ĝi fariĝis tro mallonga. Ĉu mi fortranĉis tro multe? Estas tute nekompreneble.....

Patrino (en noktvesto): Nu edzo, kiel nun konvenas la pantalonon?

Patro: Nu, rigardu! Kio okazis kun ĝi?

Patrino: Ho ne, — sed — mi —

Patro: Sajnas, ke sorĉisto ĉi tie laboris!

Lena (en noktvesto): Mi volas vidi, kiel nun la pantalonon vestas la patron. Ĉu bone, paĉjo?

Patro: Nu, rigardu!

Lena: Sed — ja ne eblas — tion mi tute ne komprenas — Ĝi estis nur manlarĝon tro longa, ĉu ne?

Avino: He, Johano, ĉu vi ne ĝojas? Vi povas nun trankvile ekvojaĝi. He..... kio okazis?

Patrino: Jes..... mi diros: hieraŭvespere antaŭ enlitiĝo mi fortranĉis parton, sed ne tiom.....

Lena: Kaj ankaŭ mi volis surprizi la patron kaj mi fortranĉis parton.

Patro: Kaj ankaŭ mi ludis tajloron.

Avino: Ho, mi dezirus estu dorminta!

Patrino: Do — ankaŭ vi..... (*la avino kapjesas*).

Patro: Kion mi nun faru! Estas senespere! (*oni sonorigas*).

Lena: Mi iras malfermi. (*revenas kun skatolo kaj letero*).

Patro (legas la leteron):

Sinjoro!

Nia komizo enpakis hieraŭ por vi malĝustan pantalonon pro troa okupiteco. Ĉar vi rakontis, ke vi ĉi matene frue devos forvojaĝi, ni prizorgis, ke vi sufiĉe frue ricevu ĉi tiun pantalonon..... La alian ni revenigos de vi ...


Patro: Kaj tiu estas distranĉita!

LA SOLVOJ EL No. 7.

k	v	a	r
v	i	p	o
a	p	u	d
r	o	d	o

2. Enigmosolvado (salmo-nevo-ido-migdalo).
 Premion gajnis: K. Akkermans, Amsterdam (Ned);
 S.ino Lepinto, Dijon (Franc). Premion pro verkaĵo gajnis
 N. R. Bryant, Fordingbridge (Angl).

ENIGMOJ.



a, a, d, e, e, f, i, i, i,
 k, k, l, m, n, n, n, o, o,
 o, o, p, r, t, v.

La vortoj signifas:
 1. arbon; 2. anon de la
 familio; 3. beston; 4. mo-
 numenton.

Riga. B. REICHBERG.

La tuto konsistas el 16 literoj kaj signifas gravan rubrikon en ŝatata revuo.
 16.10.3.2 tempomezuro.

6.7.12.1.4.16.15 loĝejo por dikhaŭtaj dombestoj.

10.8.5.13.3.15 plumhava dombesto.

8.2.12.9.13 ne sude.

14.6.10.11.7 pika kaj tranĉa armilo.

KIAL MI ESTAS ESPERANTISTO.

(verkaĵo laŭ temo el „L.J.V.”).

Mi estas esperantisto, ĉar mia plej granda deziro estas vojaĝi en fremdaj landoj. Mi deziras paroli kaj korespondi kun homoj el ĉiuj landoj. Se mi ne povus paroli Esperanton, mi devus lerni la nacian lingvon de ĉiu fremdulo, kun kiu mi volus korespondi aŭ paroli. Sed naciaj lingvoj estas tre malfacilaj. Do mi lernis Esperanton. Ĝi estas tute facila kaj en ĉiuj landoj estas homoj, kiuj povas paroli Esperanton. Tial mi interparolas kaj korespondas sen malfacileco. Mi povas legi la librojn kaj gazetojn de ĉiu nacio, kiujn oni redaktas en Esperanto, kaj kelkfoje mi povas aŭskulti Esperantajn paroladojn de fremdaj radistacioj.

Tial mi estas esperantisto kaj mi konsilas ĉiun personon en la mondo: „Lernu Esperanton!”

Tordingsbridge (Angl)

M. BRYANT (16 jara).

LOGAS LA PRINTEMP' (Ĉenkanto por 3 voĉoj).

gaje

①

1-Es 1 1 | 2 2 3 3 | 4 4 5 1̇ | 5 3 2 1̇ 2 |
 Ri - de - tan - te, ri - de - tan - te lo - gas ĉi - e la prin-

②

3 3̇ 3 3 | 4 4 5 5 5 5 | 5 4 3 2 1 5 |
 temp'. Ri - de - tan - te ha, ha, ha, ha, ha, ha, ha, ha, lo - gas

③

3 1 5 5 | 1 5 5 5 5 | 5 4 3 2 1 1 1 1 |
 ĉi - e la printemp'. Ha, ha, ha, ha, ha, ha, ha, ha, ha, ha, ha,

2 2 2 2 3 3 3 3 | 5 5 5 5 5 4 3 2 | 1 3̇ ||
 ha, ha, ha, ha, ha, ha, ha, ha, ha, ha, ha, ha, ha, ha, ha.

Antverpeno (Belg).

Trad. J. v. SCHOOR.

LUDO (Proverboj).

La gvidanto skribas proverbon sur la tabulon, sed li uzas demandsignojn anstataŭ literoj. Ekz: ?????? ?????? ??????? ?????? ??????. Ĉiu ludanto nomas laŭvice unu literon. Se ĝi estas en la proverbo, la gvidanto skribas ĝin en la lokon de la koncerna demandsigno. Tuj kiam iu opinias, ke li scias la proverbon, li rajtas diveni, sed nur unu fojon! Tiu, kiu trovas „la misteran saĝon” gajnas la ludon kaj skribas novan proverbon sur la nigran tabulon, laŭ la sama maniero.

Rim.: „La Proverbaro Esperanta”, de D-ro Zamenhof (mendebla ĉe red. „La Juna Vivo”) enhavas multajn taŭgajn proverbojn.

Buinen (Ned)

M. MEDEMA.

Ĉiu, kiu varbas 5 novajn abonantojn je nia revuo, ricevos donace jarkolekton de „La Juna Vivo”. Do multvalora libro de proksimume 200 paĝoj.

LA DUDEK KVINA LECIONO.

A. La Inteligenta Indiano.

Indiano venis hejmen kaj vidis, ke oni dum lia foresto **ŝtelis** la viandon, kiun li pendigis sur arbo. Li atente esploris la ĉirkaŭaĵon de la **kabano**, kaj foriris por **persekuti** la ŝteliston.

Post **duona** horo li renkontis du ĉasistojn. La indiano demandis, ĉu ili vidis malgrandan, blank-**haŭtan**, sufiĉe maljunan viron, kiu portas karabenon, kaj havas kun si sen-**vostan** hundeton.

„Ne,” respondis unu el la viroj, „sed kial vi demandas tion?”

„Ĉar tiu viro dum mia foresto ŝtelis mian viandon.”

„Dum via foresto? Kiel vi do tiom precize povas priskribi lin?”

„Aŭskultu. Liaj post-**signoj** montras klare, ke li metas la piedojn iom **flanken**. Tion ni, indianoj, ne faras, do li estas blankulo. Liaj paŝoj estas tre mal-**egalaj**. El tio mi **konkludas**, ke li ne plu estas juna. La viando pendis de arbobranĉo. Por kapti ĝin, li faris ŝtupon el kelkaj **ŝtonoj**, li do ne estas granda. Kiam li lokis sian armilon al arbo, ĝi iom **difektis** la **ŝelon**. Ĉar tiu senŝela **makulo** estas proksima al la tero, mi konkludas, ke li portas karabenon. Dum ĝia mastro ŝtelis la viandon, la hundeto sidis en la **sablo**. **Laŭ** la post-signo mi povas vidi, ke ĝi ne havas voston.”

Ambaŭ ĉasistoj miregis pri tiom da inteligenteco kaj deziris al li multan **sukceson**.

B. Bona — boneco, bela — beleco, granda — grandeco, larĝa larĝeco, sana — saneco; amiko — amika — amikeco, homo — homa — homeco, patrino — patrino — patrineco; apud — apuda — apudeco, super — supera — supereco; ebla — ebleco.

C. $\frac{1}{2}$ = duono

$\frac{1}{3}$ = triono.

$\frac{2}{3}$ = du trionoj

$\frac{7}{8}$ = sep okonoj

2 $\frac{1}{8}$ = du kaj okono

3 $\frac{3}{7}$ = tri kaj tri seponoj.

a. Kopiu, traduku kaj lernu la novajn vortojn. b. Laŭtleĝu la lecionon.
c. Kopiu kaj traduku A, B, C en vian kajeron. d. Respondu el jenaj demandoj:

Kio okazis dum la foresto de la indiano? Kion faris la indiano? Kial li esploris la ĉirkaŭaĵon de la kabano? Kiam li renkontis la ĉasistojn? Ĉu ili vidis la ŝteliston? El kio konkludis la indiano, ke la ŝtelisto estas blankulo? Kiel li sciis, ke la **fripono** estas maljuna? Kiel la ŝtelisto kaptis la viandon? Kion la indiano konkludis el tio? Kial la indiano opiniis, ke la ŝtelisto portas karabenon? Kiel li eksciis, ke la hundo ne havas voston?

LA DUDEK SESA LECIONO.

A. Lernu Esperanton.

Alie vi povos sperti la saman kiel la amerikano Benjamin Franklin. Li estis ne nur la inventisto de la **fulmo-ŝirmilo**, sed ankaŭ unu el la plej **eminentaj** amerikaj **ŝtatis**toj de la 18a **jarcento**. Okazis, ke la amerikanoj bezonis iun, por preparoli gravajn aferojn kun la franca registaro. Tiam ili **elektis** Benjamin Franklin, kiu **ŝajnis** al ili la plej taŭga persono por tio. Unu malfacilaĵo tamen estis: Franklin nur malbone parolis kaj komprenis la francan lingvon. Sed li esperis **baldaŭ** lerni la lingvon en la lando mem.

Kiam li estis mallongan tempon en Parizo, kaj lia scio pri la lingvo ankoraŭ ne estas tre vasta, oni **invitis** lin al prelego. Franklin vizitis ĝin kune kun sinjorino, bone konata al li. Li intencis **aplaŭdi** nur, kiam lia kunulino tion faros. Tiel neniu rimarkos, ke li neniom komprenas el tio, kion oni parolis. Sed li faris **kalkulon** sen la mastro, en ĉi tiu okazo la parolanto. Al tiu ĉi homo tre **plaĉis**, ke la fama amerikano estas inter lia aŭdantaro, kaj li faris **laŭdan** paroladon pri li.

La sinjorino, kiu estis kun Franklin, trovis tion treege **kompleza** kaj ŝi aplaŭdis tutforte. Franklin vidis tion kaj same aplaŭdis. La ĉeestantoj ne malmulte miris, vidante kiel la amerika ŝtatis to aplaŭdas sin mem.

VANE.

B. Panjo = kara patrino; Manjo = kara Mario; Sonjo — Sofio; Lunjo — Luizo.

C. Paĉjo = kara patro; Peĉjo = kara Petro; Joĉjo — Johano; Luĉjo — Ludoviko.

a. Kopiu, traduku kaj lernu la novajn vortojn. b. Laŭtleĝu la lecionon. c. Kopiu kaj traduku A, B, C, D en vian kajeron. d. Rakontu per propraj vortoj la enhavon de **A**.

Traduku: Ruĝ-**vanga**, novjara, inkfabrika, lernolibro, mondmilito, bondeziro, vivmaniero, dirmaniero, bonmaniero, pensmaniero, **skribmaniero**, **libertempo**, mondparto, **virporko**, ŝipveturi, marbordo, infanfeliĉo, **ledfabrika**, **naturamiko**, **monsako**, marakvo, **havenurbo**, **ĉefurbo**, ĉefpordo, **harbuklo**, piedpilko, **terglobo**, **nord-poluso**, **ŝparplano**. (ripetu la ludon paĝ. 69).

KOREKTO: Legu en la 21a leciono, („L.J.V.” No. 7, p. 100), la 5an linion: Ili vidis **lian** domon, anstataŭ **ilian**.

KORESPONDADRESOJ.

- Anglujo:** Gekursanoj de Guy B. Tordoff dez. kor. kun ĉiuj landoj. Adreso: 113, Trym Side, Sea Mills, Bristol 9.
- Belgujo:** 18 jara junulo dez. kor. kun gesamideanoj el Ameriko aŭ Anglujo. Jos Montmirail. Mechelschesteeweg 59, Kontich (Antwerpen).
- Ĉeĥoslovakujo:** 16-jara studentino dez. interŝ. poŝtk. k. let. el ĉiuj landoj. Zdenka Šimšálková, Těšetice ĉe Olomouc.
- Ĉeĥoslovakujo:** 14-jara studentino dez. interŝ. poŝtk. kaj let. el ĉiuj landoj. Svatava Cveková, Těšetice ĉe Olomouc.
- Ĉeĥoslovakujo:** 15-jara studentino dez. kor. kun ĉiuj landoj. Jirina Kreménková, Těšetice ĉe Olomouc.
- Danujo:** S.ro B. Svendsen, Norgesgade 8, Aalborg, 23 jara, dez. kor. kun ĉiuj landoj.
- Francujo:** S.ro Clerc René, kontregistristo, 21 Rue Coterelle Maisant, Miens (Somme), dez. kor. kun gesamideanoj el ĉiuj landoj.
- Nederlando:** 6 geknaboj(grupe) k. 30 pli aĝaj, dez. kor. pri ĉ.t. kun ĉiuj landoj. Certe respondos. S.ro Jac. Vonk, Hanepad 48, Zaandam.
- Nederlando:** S.ro Adr. Hojman, Slotweg 362, Egmond a/d Hoef, dez. kor. pri ĉiuj temoj. Resp. certa.
- Nederlando:** J. M. v. Weeren, Heemstedestr. 11 (II), Amsterdam (W) dez. kor. kun Rusoj kaj Balkan-Ŝtatanoj, interŝanĝi esp. aĵojn pri ĉiuj landoj.
- Nederlando:** Tre volonte mi dezirus kor. kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj. Skribu al: S.ino Manshanden, Bloemstr. No. 35, den Helder.
- Nederlando:** S.ro H. Hubers, Boompjes 11, Almelo, sendas al ĉiu, kiu sendas al li poŝtmarkojn, la saman kvanton. (ĉiuj landoj).
- Nederlando:** 4 geamikoj dez. kor. kun la tuta mondo, pri ĉiuj temoj. Adr: H. Toes, ĉarpentisto, Stolpe. Certe respondos.
- Japanujo:** 23 jara telegrafisto, Haĵime Kuŭahara, Fujimiĉjo, Kuŝiro, dez. kor. kun ge-P.P.T.-istoj en poŝtejoj en ĉiuj landoj.
- Svedujo:** S.ino Ragnhild Larsson, Godhemsgat. 7, Göteborg, deziras korespondi pri ĉiuj temoj.
- Svedujo:** S.ro Gustav Lager, Rambersväg. 17, uppg. C, Göteborg, deziras korespondi precipe kun ĝardenistoj.
- Svedujo:** S.ro Elof Lindbom, Måns Bryntessonsgat. 1, Göteborg, dez. korespondi pri ĉiuj temoj.
- Anglujo:** 18 lernantinoj (16—18) dez. kor. kun gejunuloj ne pli malaĝaj en ĉiuj landoj. Ne interŝ. poŝtm. kaj ne partoprenas ĉenleterojn. Adr: F.ino V. C. Nixon, 183 Woodlands Park Rd., Bourneville, Birmingham.
- Ĉeĥoslovakujo:** Gekursanoj serĉas korespondantojn el ĉiuj landoj. Skribu al: Fr. Blaha, faka instruisto, Uhersky Brod.
- Danujo:** Grupo da Esperantistoj dez. kor. Skribu multnombre al jena adreso: Rikardo Kristensen, Norgesgade 8 (I), Aalborg.
- Nederlando:** 11 junaj geesperantistoj (10—14 j) dez. kolektivian korespondadon kun ĉiuj landoj. S.ro Bart C. Elskamp, lernejestro, Hindelopen.
- Francujo:** 20 junaj geesperantistoj (12—16 jaraj) dez. kor. kun gejunuloj, ĉu kolektive, ĉu individue. Certe resp. S.ro Jozelli, 3 Rue Bosquet, Fenain (N).

Polujo: S.ro A. A. Rzepka, Rózian n/Narwia, Wojew. Warszawskie, ul. Wilénske 9, dez. kor. kaj interŝ. esperantaĵojn kun gesamideanoj el ĉ.I.

Portugalujo: 26 jara fraŭlo dez. kor. kun ĉiuj landoj, ĉefe la orientaj. Adr: S.ro Jose Fco Godinho, Aljustrel, Alentejo.

Nederlando: 2 knaboj, 12 kaj 11 jaraj dez. kor. kun samaĝaj esperantistoj. Interŝanĝas poŝtmarkojn. G. v. Soest, Lingsforterweg, Arcen.

Japanujo: S.ro Yamaito Sine, Kakurenzi, uti Suwanomati 2, Tyôme Kurumesi, Hukuoka-ken., dez. kor. per let. aŭ poŝtk. kun ĉiuj landoj.



Nia fervora jugoslava peranto, S.ro Golobiĉ, kun sia infangrupo, kiun li sukcese instruas per la internacia lernolibreto „La Juna Vivo”.

POR LA JUNULARO.

Paska Libertempo por Junulinoj.


Moderna, bone ekipita popollernejo en Birmingham (Angl), kie oni instruas Esperanton, deziras inviti lernantinojn (11—17 jaraj) el aliaj landoj, pasigi unu semajnon, de sabato 27 Marto — sabato 3 Aprilo ('37) por interkonatiĝi per Esperanto kun la anglaj lernantinoj. — La kosto, sen vojaĝelspezoj, sed inkl. de loĝejo en la lernejo mem, manĝoj kaj ekskursoj, estos nur po 15 ŝil., por persono, por la tuta semajno. — Estas necese, ke ĉiu grupeto estu prizorgata de responda persono.

La programo estas tre, tre alloga. Petu informojn al F.ino N. Sheppard, Tinker's Farm School, Northfield, Birmingham, Anglujo.

Tendaro por Junuloj ĉe la Orienta Marbordo.

Oni proponis aranĝi por esperantistaj knaboj kaj junuloj (14—18 jaraj), tendaron apud Ipswich, Suffolk, ĉe la orienta marbordo de Anglujo, dum la lastaj 15 tagoj de Aŭgusto. Ĉiu **esperantista** junulo — ĉu komencanto aŭ spertulo — estos bonvena. Oni **precipe bonvenigos alilandajn junulojn**. La kosto por la 15 tagoj estos proksimume 30 ŝil., kiu enkalkulas la koston de manĝaĵoj kaj dormloko en tendo, sed ne veturkoston.

Interesatoj bonvolu sendi nomojn kaj adresojn al: la sekretario **B.E.A., 142 High Holborn, London, W.C. 1**, kiu dissendos detalojn, kiam la definitivaj aranĝoj estos faritaj. — Plenaĝuloj, kiuj deziras iel helpi, bonvolu skribi al la Sekretario.



BAZEL: Unu el la kvar pontoj, kiuj ligas la du partojn de la urbo. Bazel estas fama laŭ kultur-historia vidpunkto kaj posedas kelkajn konstruojn en mezepoka stilo.

„La Juna Vivo”-karavano, kiu vizitos la urbon ĉi somere, restos duonan tagon tie por rigardi diversajn vidindaĵojn.

VOJAĜO AL SVISUJO KAJ LA PARIZA MONDEKSPozICIO.

Per kelkaj vortoj ni resumu la programon pri la vojaĝo al Svisujo. „La Juna Vivo” organizas 15 tagan aŭtobus-vojaĝon por tre malalta prezo: 52 guldenoj, ĉio enkalkulita. Ni traveturos la plej belajn regionojn de Belĝujo kaj Francujo. Dum la vojaĝo ni interkonatiĝos kun multaj alilandaj esperantistoj.

Por pli detalaj informoj legu la januaran numeron de la gazeto.

Respondoj al demandoj:

1. La nederlandanoj ne bezonas propran pasporton. Ili povas vojaĝi per kolektiva pasporto.
2. La angloj en la suda parto de Anglujo plej malkare povas transiri la maron per ŝipo Dover-Ostende. Duvetura bileto kostas malpli ol 1 £.
3. Esperantistoj en Bazelo zorgos pri amika akcepto tie.

Ni ricevis ankaŭ sciigon pri instruista Esperanto-kunveno en Parizo, kiu okazos dum la tagoj, kiam ni vizitos ĉi urbon. Ni do havos multan okazon interkonatiĝi kun alilandaj esperantistoj.

RICEVITAJ ESPERANTAJOJ.

Ni atentigas eldonantojn de libroj ke „La Juna Vivo” estas gazeto por la junularo kaj sekve recenzas nur tiujn librojn, kiuj estas interesaj por la junularo. Aliajn verkojn ni nur mencias.

LA VERBO EN ESPERANTO, J. Glück kaj J. H. J. Willems. 48-paĝa. Prezo 0,65 gld. Eld. W. J. Thieme & K-io en Zutphen.

MIA LERNOLIBRO, P. J. Soeters. 136 paĝoj, prezo: broŝ. 1,20 gld.; kart. 1,40 gld. Eld. W. J. Thieme & K-io en Zutphen, Ned.

LEERBOEK VOOR ESPERANTO, D.ro F. Szilágyi. Al la ned. lingvo adaptis G. Penterman. 99 paĝoj. Eld. Ned. Esp. Centro. Prezo 0,75 gld.

SLOVAKA kaj ĈEĤA ŜLOSILOJ. Eld. la Ĉeĥoslovaka Esp-Asocio. prezo: 1 ĉ.kr.

LA AVENTUROJ DE MARTENO DRAKE, de G. Norway. El la angla lingvo trad. Walter Severn. Eld. Brita Esp. Asocio. Prezo 1,75 gld. Recenzo pri la verko aperos en la aprila n-ro de „LJV”.

Esperantaj gazetoj, aboneblaj ĉe ni:

<i>Verda Revuo</i> , monata	jara	f 1,50	<i>Literatura Mondo</i> , monata	jara	f 4,50
<i>Nia Gazeto</i> , monata	„	f 1,35	<i>Lingvo libro</i> , trimonata	„	f 0,80
<i>Scienca Gazeto</i> , dumonata	„	f 1,50	<i>Esperanto-Internacia</i> , mon.	„	f 2,50
<i>Heroldo de Esp.</i> , semajna	„	f 6,80	<i>Sennaciulo</i> , monata	„	f 1,50
<i>The British Esp.</i> , monata	„	f 1,20	<i>Sennacieca Revuo</i> , monata	„	f 2,50

Specimenoj. Ni sendas senpage specimenon de „La Juna Vivo”. Specimeno de *Literatura Mondo* kostas 20 cendojn. Ni ĝenerale havas ekzemplerojn de la aliaj kaj volonte sendas ekz. al iu ajn interesato kontraŭ 5-cenda poŝtmarko holanda aŭ egalvaloro.

ANONCETOJ. (30 c. por ĉiu linio).

LINGVO-LIBRO informas vin pri ĉiu okazo en nia literaturo. Abonu ĝin kune kun viaj amikoj. **Jarabono: 0,80 gld. Specimeno: 0,05 gld.**

Neniu lingvo sen literaturo. Plej trafe prezentas al vi nian literaturon la revuo **LITERATURA MONDO**, luksa aspekto, ilustrita. **Jarabono: 4,50 gld. Specimeno: 0,20 gld.** Ambaŭ ĉe „La Juna Vivo”, W. Graftdyk.

PORINFANA LITERATURO EN ESPERANTO. Verkante novan „Gvidlibron tra la Esperanto-movado” mi enmetis ĉapitron porinfana literaturo en Esperanto. Kun danko mi akceptus atentigon pri tiuspecaj verkoj (aŭtoro, tradukinto, eldonejo, nomo de la verko, jaro-prezoj). Ĉiu sendinto ricevos de mi libron. Skribu al **Julie Šupichová, Praha II, Malá Štěpánská, Ĉeĥoslovakujo.**

KONATIGU KUN ESPERANTO-GAZETOJ. Por 0,40 gld. (3 resp. kup.) oni ricevas 10 diversajn esp. gazetojn. Adr: **Red. „La Juna Vivo”.**

TAŬGA LEGO-MATERIALO por ĉiuj esperantistoj estas malnovaj ekz. de „La Juna Vivo”. Por 0,20 gld. (eksterlande 2 resp. kup) oni ricevas 10 ekz. (Laŭplaĉe samajn aŭ diversajn).

REKLAMTARIFO:

1 paĝo: 15 gld.; ½ paĝo: 8 gld.; ¼ paĝo: 4,5 gld.; ⅛ paĝo: 2,5 gld.

NE FORGESU

ke la binditaj jarkolektoj de

„LA JUNA VIVO”

estas la plej valoraj kaj malkaraj
lernolibroj por Esperantokursoj
en ĉiuj landoj

Prezo: 1,6 Sv. fr. = 0,75 gld.

**NEDERLANDA ESPERANTO
KONGRESO**

dum Pasko (27-28-29 Marto)
en den Helder

Petu aliĝilojn aŭ plurajn informojn al
la sekretario de la L.K.K.

S.ro P. DE JONG, BEUKENKAMP-
STRAAT 4, DEN HELDER.

Ĉiu esperantisto estos bonvena, kian
ajn relegion aŭ politikan konvinkon li
havas.

Vi jam longe deziras interesan, amu-
zan kaj instruon gazeton? Jen ĝi:

VERDA REVUO

Ĝi estas riĉe ilustrita, simple skribita
kaj aperas ĉiumonate regule jam la
trian jaron. Tutjara abono estas 1,5
guld. Postulu senkoston specimeno ĉe
la abonejo por Ned.:

„LA JUNA VIVO”, West-Graafthijk.

La Esperantistoj revis havi gazeton
redaktatan de profesiaj ĵurnalistoj. Ilia
revo efektiviĝis! *Aperis:*

NIA GAZETO

Ĉefredaktoro: S. Grenkamp-Kornfeld.

Abonprezo: fr. fr. 15 = 1,35 guld.

Petu senpagan specimeno ĉe „La
Juna Vivo”, West-Graafthijk.

SKRIBA KURSO

por A. kaj B.

(nur por holandlingvanoj).

Tre detala B-kurso. Gvidanto

Simon Aarse.

Petu senpagan prospekton. Ĉiu kandi-
dato sukcesis.

La Verda Stelo, Radioweg 45,
Amsterdam-O.

JEN LA SOLVO!

Vi ne kuraĝas starigi esp. kursojn,
ĉar vi ne estas sperta instruisto? Ne
timu, per la simpla metodo en la „In-
ternacia Lernolibreto”

„LA JUNA VIVO”

vi povas instrui!

La tre malalta prezo kaj la varia en-
havo certe allogos multajn kursanojn!
Petu specimeno!!! (0,20 gld. aŭ 2
resp. kup.).

La ĉarma „verda” Danlando vokas
vin al:

**„MARBORDA ESPERANTO-
RESTADO INTERNACIA”**

en:

Fuglso, Aarhus,

de la 18a ĝis la 28a de Julio.

Plena pensio: 13 gld.

Ĉiaj informoj ĉe S.ro Harald Grön-
borg, Risskov, Danlando; S.ro August
Weide, Hamburgo (Germ), kunlabo-
ranto.

LA LUMTURO DE ESPERANTO

Monata, Sendependa organo.

Multe da artikoloj estas en franca kaj
esperanta lingvoj. Jarabono 10 fr. fr.

Redaktejo, Villa Zamenhof Sisteron.

FRANCLANDO

Subtenu La Junularlaboron, mendu viajn librojn ĉe le redakcio de „La
Juna Vivo”! (Petu senpagan L. M. libro-liston!).